

# BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 2 svisaj frankoj, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Anonctarifo: 1 kv. cm. — 1 levon;

korespondo: 1 vorto — 1 levon. Por fremdlando — duoble. Poŝtĉekkonto No 1133

Adreso: str. Alabin, 50. SOFIA, Bulgario.

**Jaro XVIII**

**Majo-Junio 1937**

**9-10**

## Nia unua zorgo

„Bulgara Esperantisto“ estas la konstanta ligilo inter ni. Per ĝi ni esprimas niajn komprenojn, per ĝi ni povas pri-trakti la efektivigotan laboron de la Asocio.

La komuna deziro de ĉiuj gesamidea-noj en la kongreso estis, ke ĝi aperadu regule ĉiumonate. Tio ne estas neebla afero, sed ĝi dependas plene de la bulgaraj esperantistoj. Por atingi tion ni bezonas almenaŭ mil pagantajn abonantojn. En la pasinteco ni havis ilin!

Dum 1935—36 jaro la nombro de la pagintaj abonantoj estis nur 535; en la ĵus pasinta asocia 1936 37 jaro ilia nombro atingis 669.

Krome, en la lasta asocia jaro la gazeto estis dissendata al 1800 adresoj. Preskaŭ mil bulgaraj esperantistoj ricevis ĝin, legis ĝin, sed . . . ne pagis ĝin.

Proksimiĝas jam la sezono por vigla propaganda laboro. Ni entreprenu unue la plej necesan kaj la plej facilan por nun taskon: garantii la vivon kaj la regulan aperadon de la gazeto.

Kion ni devas fari?

**Unue:** Ĉiu ĝisnuna abonanto tuj sendu sian abonpagon por la nova jarkolekto. Ne prokrastu! Ni bezonas la abonmonon en la komenco, ne en la fino de la asocia jaro. — Do, plenigu en la poŝt-icejo noton-formulon por transigo de 20 levoj al la Asocio per ĝia poŝtĉekkonto № 1133. Tio sufiĉas. Vi jam estos plenuminta vian unuan devon.

**Due:** Renkontante samideanon, demandu, ĉu li same pagis sian abonon. Se li ne ankoraŭ faris tion, invitu lin doni al vi la sumeton kaj vi mem sendu ĝin al la Asocio per la supre montrita maniero.

Jen tiel ĉiu povas helpi efike la movadon.

Vigle komencu tiun aferon, samideanoj! Garantiu la normalan vivon de nia gazeto. La redaktantoj de sia parto zorgos por ĝia plibonigo. Per komunaj fortoj ni havos belan kaj modelan „Bulgara Esperantisto“-n.

**Ada**

Ĉi-JARE la kongresanoj en Pazarĝik montris viglan intereson kaj faris bonan laboron.

Nia foto montras momenton antaŭ kongresa kunsido: la delegitoj kolektiĝas antaŭ la kongresejo.



# Niaj esperanto-poetoj

## Ne plu cedi!

Mi ĵetis mian liron melodian  
kaj diris: mi ĉesigas mian kanton!  
Riproĉis mi la mondon apatian,  
en fajron ĵetis mian revon sanktan.

Kaj longe ploris mi je mia sorto,  
konsolon trovís nur en larma plendo.  
Mi revis mian finon, kaj pri l' morto  
mi jam meditís en amara sento . . .

Ĉu falos mi rezigne kaj sen lukto?  
ĉu mia kredo, agoj, idealo,  
ĉu vivo mia — restos do sen frukto?  
Ne! — tamen — ili estos ja realo!

Mi kredas je l' estont' per kredo forta,  
je ĉi estont' ne povas mi ne kredi!  
Premite de la zorgo kaj de l' sorto,  
decidas tamen mi: ne cedi, ne plu cedi!

Petro Jordanov

## Kanto de l' gufoj

Ni de la nokto birdoj estas,  
malamas ni la sunon!  
En ŝimo kaj ruín' ni nestas,  
ni ŝatas la mallumon!

For, for de ni la lumo!

Okulojn niajn pikas vero,  
en kot' ni trovas ĝuojn.  
subígí volas ni la teron  
ni — gufoj kaj noktuo!

For, for de ni la lumo!

Obskuron kaj kadavrojn donu,  
estingu vi la lumon!  
Malvero kaj maljusto sonu  
je nia oportuno!

For, for de ni la lumo!

Zefiro, Varna

## El „Skizoj“

— Flo . . rojn! Mi petas, gesinjoroj,  
Vi aĉetu florojn!  
Printempan ĝojon,  
feliĉon hejman . . .  
Flo-rojn, mi petas vin —  
aĉetu buntajn florojn!

Kaj kiel ploron, raŭke vortoĵn elbuŝigas  
infano kompatinda,  
ĉifonvestita  
filo de l' mízero.  
Proponas li al ĉiuj florojn. —

Nur li mem neniam  
komprenas ĝojon proponatan,  
ne sentas la aromon delíkatan  
de l'ĉarmaj floroj!

\*

Apud la granda domo,  
sur trotuaro, vico da blínduloj  
etendas manojn,  
tremante,  
tenante  
ŝulaĉojn, leterfoliojn, razilojn —  
unu tutan magazenon  
en la kesteto sur la brak' pendanta!

Unutona vokado!  
Ne, ne vokado — ploro,  
petema, konstanta, plendanta  
rekantaĵo!  
Per komerca konkureca maniero:

— Mi petas, aĉetu:  
dudek kovertoj kaj dudek leteroj —  
tri levojn.  
filtriloj por ke ne ŝprucu la akvo,  
bonvolu, bonvolu ŝulaĉojn — —

Kaj post la nigraj kaj senformaj okulvitroj  
fermite tremas la okuloj, la  
okul-ruinoj!

Sekaj gutoj de larmoj  
montras la feliĉon de l' blínduloj!

Todor Oŝanski

Rinma

# Tro malfrue

Originala rakonto

Ne, Petro ne estis drinkulo. Homo kiel ĉiuj homoj. Drinkis nur en festo. Iras en la drinkejon, kunvenas kun amikoj, ili interregalas sin, konversacias, ridas kaj revenas hejmen. Poste tutan semajnon laboras de mallumo ĝis mallumo. Laboras li kaj profunde en la brusto nutras unu helan revon: vidi sian Ivanĉon tre riĉa kaj tre feliĉa.

Sed jen, la kruela vivo ekpersekutis lin, levis sian feran pugnon kaj batis lin ĝuste en la koron. Venis vulpo, formanĝis la duonon de la kokinoj; falis hajlo, difektis la semaĵojn; pro ia nekonata malsano — mortis la porko; kaj ne sufiĉis ĉio tio, jen pendigis unu nokton per la ŝnura brido la pli bona bovo. Pro ĉagreno li ne povis ekteni sin hejme, iris drinkejon, vendis la felon al la drinkejisto kaj por unua fojo ebriiĝis. Revenis hejmen kaj por unua fojo interkverelis kun sia edzino. Poste reiris en la drinkejon. De tiam li estiĝis regula vizitanto je ĝi. Ju pli li drinkas des pli drinkemas. Kiam la mono de la felo finiĝis, li komencis kaŝe vendi diversajn objektojn kaj fordrinki la monon. Je la loko de la antaŭa hela revo aperis alia: drinki, drinki, drinkadi senĉese, senfine.

Estis en la komenco de novembro. Unu vesperon en la drinkejo de Denĉo okazis granda festeno. Petro regaladis ĉiun ĉeestanton. Nudkape, en ĉemizo, li staris ĉe tablo kaj kriegis:

„Kiu? Ĉu mi ne drinku? Ne nur mi! Ne: ĉiuj drinkos! Donu, Denĉo! . . . Donu, hundaĉo! . . . Edzino, diablo, ĉu vi aŭdas? Ne unu agron, ne: ĉiujn mi vendos, ĉiujn . . . Sciu vi ke en tiu ĉi domo mi ordonas! Kuru, Denĉo, kuru, fiulo! Vi kuros kaj kantos, alie mi sendos vin al la transa mondo! . . . Ĉu vi vidas tion ĉi?“

Petro eligis grandan tranĉilon kaj eksvingis ĝin en la aero. Denĉo flugadis de tablo al tablo, alportadis plenajn kaj prenadis malplenajn karafojn. Ŝvito gutis de lia frunto

„Fi . . . porko . . . Midiros al vi kiu kiun sendos al la alia mondo, sed atendu“ . . . murmuris li kaj flugadis kiel freneza.

„Sinjoroj, mi vin regalas, ke estu vi gajaj. Kial vi ne kantas? Kiu ne kante-mas — tuj for!“ kriis Petro.

Unue ekzumis kelkaj ĝenemaj voĉoj sed iom post iom fariĝis terura, netole-rebla kanonado. Petro starante sur la tablo subite rimarkis unu homon kiu drinkis sen kanti. Petro tuj iris al li:

„Vi kial ne kantas?“

Mi ne volas!“

„Kantu, fiulo!“

„Mi ne volas! . . .“

Ili ambaŭ staris pretaj ekataki sin. Subite la vilaĝano levis pugnon, batis Petron sur la nazon kaj forkuris eksteren. Post li saltis Petro kaj ambaŭ malaperis en la malluman dezertan straton.

Denĉo, profitante la okazon, fermis la drinkejon, pelante per insultoj la ebriajn vilaĝanojn

Post longega kurado Petro revenis al la drinkejo, sed la pordo estis fermita. Li puŝis ĝin unu, du fojojn, poste komencis raŭke krii:

„Denĉo! Denĉo! . . . hundaĉo . . . ĉu vi aŭdas, hej . . .“ Neniu respondis.

„Denĉo! fiulo! . . . Pro kio fermis la diablo? Ĉu ne estas veninta mia belulino por igi lin fermi? Atendu . . . Ne estas dubo! Fi . . . la hundino! . . .“

Petro ekkuris hejmen. Malhelaj nuboj kovris la ĉielon. Estis mallume kiel en korno. Li apenaŭ trovis sian domon. Longe serĉis ĝiskiam trovis la seruron, puŝis sed la pordo evidentiĝis ŝlosita.

„Fi . . . malpurulino! Ne sufiĉas, ke igis Denĉon fermi la drinkejon sed ankaŭ mian propran domon ŝlosas. . . Ho, mi instruosvin kiel oni ŝlosas! Atendu . . . kie estas la hakilo? . . .“

Petro iris ĝin serĉi, tamen nenion trovis. La kapo pezis, la lacego pro la freneza kurado tra la vilaĝo tiris lin al la tero. Pro kio li ne sidiĝu? Ne . . . ne . . . li ne sidiĝos ĝis kiam ne eniros en la domon. Ekiris. Iu tuj premis large sub la genuoj. Petro balanciĝis, kliniĝis kaj

falis en ian trogon. Ekpenis leviĝi . . . ne povis. Ja kial li leviĝu? Ankaŭ ĉi tie oni povas dormi. . . Li delasis kapon, pasigis langon sur la sekiĝintaj lipoj kaj ekdormis.



Petro marŝas sur ligna ponto. Ĝi krakas, balanciĝas, malsupreniĝas kaj falas kun Petro en la riveron. La rivero ekportas lin. Frostaj gutoj falas sur lian vizaĝon. Petro penas elnaĝi al la bordo, sed ĝi estas malproksime. Antaŭ li aperas akvofalo — profunda abismo. Helpon . . . Helpon! . . . Li superpendas. Finiĝis. „O-o-o . . . O-o o! . . .“ ekkrias Petro kaj vekigigas.

La ĉielo malalte pendis sur la tero kaj verŝis multajn blankajn steletojn kiuj falis sur lian vizaĝon. Frostega vento vipis per nevideblaj vipoj kaj igis lin tremi kiel tremola folio. Je oriento komencis lumiĝi. Petro rigardis ĉirkaŭe kaj konstatis, ke troviĝas en la lavtrogo. Kun granda peno li levis sin kaj eliris el ĝi. Estis malfortege al li. Apenaŭ eniris en la domon. La kapo dolore pezis, la lipoj estis sekiĝintaj, la muskoloj estis tro-lacaj. Kiam eniris en la ĉambron, sur la litaĉo ankoraŭ dormis lia edzino kaj lia fileto. Petro kviete kuŝis. Sur lia korpo pasadis sennombraj formikoj sed iom post iom ili foriĝis kaj li ekdormis. Inku-  
boj ne permesis al li dormi.

Li kelkajn fojojn vekigis pro timo.

Ankoraŭ post lia reveno Stana leviĝis. Preparis la mizeran matenmanĝon de maizpano kaj fazeola supo kaj vokis Ivanĉon kaj Petron manĝi.

„Mi ne manĝemas“, diris Petro „verŝajne mi malsaniĝos . . .“. Metis la kovrilon sur sian kapon kaj peze spirante ekdormis.

. . . Mallumo. Io moviĝas en ĝi Ĉu estas homo? Hej . . . kiu vi estas? Ĉu homo aŭ diablo mem? . . . Kion vi serĉas, fiulo? Nigra ombro proksimiĝas lin. Homo? Ne, fantomo . . . kun fera forkego en la mano . . .

„Mi formortigos vin!“ krias la fantomo. Petro penas forkuri, sed liaj kruroj ne volas obei al li. La fantomo pikegas linen la bruston ĝuste sub la koro. Teruraj kolikoj. Li vekigis, sed ili ne foriĝis kaj subita tuso disŝiris lian gorĝon. Do li

vere estas malsana. . . Certe estis tro ebria por kuŝi en la lavtrogo. Li ĉirkaŭrigardis la mizeran ĉambon. Estis neniu. Al kiu li voku? Ĉu lia edzino ne estas en la antaŭĉambro?

„Stana! . . . Stana! . . .“

Neniu. Li longe batalis kontraŭ la kolikoj kaj la tuso kiuj pli kaj pli fortiĝis. Kelkfoje penis leviĝi, sed vane. La muskoloj ne volis obei.

La aŭtuna tago rapide foriris. Timeme la suno ekrigardis tra la nuboj kaj tuj rekaŝiĝis. La pordo de la ĉambro malfermiĝis kaj eniris malalta, kurba maljunulino.

„Kiu tiel ĝemas?“ diris ŝi. „Ĉu vi, Petro? Kio estas al vi?“

Petro kun granda peno rakontis al ŝi, kiom povis rememori, kio okazis. La tuso ne permesis al li paroli.

„Jes, diris la maljunulino, nimfa malsano Ĉi-nokte vi dormis je la lavloko kaj la nimfoj nepre ĉifis vin. . . Neniul danĝere. Mi tuj iros al la sorĉistino por kuracilo. Se Stana venos, diru al ŝi por ke ne iru ankaŭ ŝi serĉi.“

„Mi diros . . .“ promesis raŭke Petro kaj ektusis.

Post duona horo venis la maljunulino, ortante en unu mano ian herbon kaj en alia — ŝovelileton da karbardaĵo. Ŝi metis la herbon sur la ardaĵon. Vulkano da grizblua fumo leviĝis al la plafono, iris al la fenestroj kaj rapide etendiĝis tra la tuta ĉambro — fumo pipra kaj sufoka. Ĝi eniris en la bruston de Petro. Li ektusis svene unu fojon, du fojojn . . . io disŝiris sin profunde en lia brusto, ekrapis supren kaj larĝa strio de sango surverŝis la kovrilon. La fumo ne kompatis ankaŭ la „kuracistinon“. Ŝi ĵetis sin al la fenestro kaj apenaŭ ĝin malfermis. Freŝa aera ondo eniris en la ĉambron kaj ekpelis la fumon. Petro daŭris tusi kaj vomi sangan.

En tiu tempo revenis Stana, kondukante Ivanĉon je mano. Ekvidinte la teruran bildon ŝi tuj haltis konsternite. Ŝi komencis plori, rompi siajn fingrojn kaj kuri tra la ĉambro.

„Dio . . . Dio . . . kion mi faru nun? Petro, kie doloras vin? . . .“

„Tie ĉi . . . ko-o-o . . . oh . . . kolikoj . . . multe. . .“ apenaŭ diris Petro kaj svene tuis Denova strio de sango

## Sub la signo de la XXIV-a

### De Varna al Pazarĝik.

La vagonaro flugrapidas al Sofio. Noktaj siluetoj de altaĵoj, dometoj, arboj alterne pasas antaŭ mia rigardo. Lumetoj ekaperas kaj tuj sin kaŝas for de la okuloj. La vagonaro flugas!... Sed kiel malrapida ŝajnas al mi tiu flugado, kiel teda! Mi volus tuj esti en la ĉefurbo kaj de tie rapide min direkti al Pazarĝik — nia dudek kvara kongresurbo. Retenata ĝojo sin kaŝas en mia brusto. Ne post longe mi estos inter gesamideanoj el tuta Bulgario. Mi antaŭsentas, ke estos tre gaje inter esperanto-amikoj de l' tuta lando, inter veraj amikoj...

Mi restas en Sofio naŭ horojn. Baldaŭ ekveturas la vagonaro al Pazarĝik. Mi estas en la stacidomo. Multaj homoj. Aro da gejunuloj gaje babilas, ŝercas. Subite inter ili mi aŭdas ŝerceman voĉon: „Kolektiĝas pacaj batalantoj“. Mia koro ekbatas ĝojege. Nun mia veturo ne estos teda. Mi havas bonan kompanion. Mi aĉetas bileton kaj eniras la vagonon. Du samideanoj flirtigas tra la fenestro la nacian kaj la esperantan flagojn. Solene ekaŭdiĝas la esperanta himno. Poste mi eksciis, ke la plimulto de la sofianoj estas anoj de la ĥoro.

— Samideano, — mi turniĝas al staranta ĉe la vagona fenestro junulo, sur kies brusto brilas verda stelo, — ĉu ĉiuj veturantoj estas esperantistoj?

— Ho, saluton! Agrable estas al mi konatiĝi... komencas li. De kie vi estas? Kiel vivas la samideanoj en via urbo?.. Ktp., ktp.—torento da demandoj kaj res-

Stana ektimis, kuris ronde en la ĉambro nekomprenante kion fari.

„Mi iros serĉi la sorĉistinon“ diris ŝi.

„Ne, ne iru, respondis la maljunulino, mi jam iris al ŝi, sed ŝiaj herboj ne helpas. Pli bone ni sidu kaj atendu la dian favoron...“

Stana daŭris plori kaj kuri. Ekstere la neĝa vespero venis preter la rivero kaj ĵetis delikatajn nigrajn tolojn, kaj la frosto premis la vilagon.

pondoj postsekvas. Poste li min konigas al aliaj du aŭ tri gesanoj kaj ni apartiĝas en kupeon apudan al tiu, en kiu estas instaligitaj la ĥoranoj. Ni gaje pasigas la tutan veturon ĝis Pazarĝik, kie jam ni estas tre intimaj amikoj, kvazaŭ de multaj jaroj konataj. En Pazarĝika stacio nin renkontas kun verda flago loka s-ano, kiu nin alkondukas en komunan bone aranĝitan loĝejon. Mi ne intencas nun tedi per detala priskribo. Mi ne havas fortojn priskribi tiun feliĉon, kiun mi spertis dum tiuj du neforgeseblaj tagoj. Ho, kiel bone oni vivas inter gesanoj! Du tagojn oni estas for de la griza ĉiutageco, for de zorgoj kaj malagrablajoj, du tagoj de gajeco kaj kultura laboro! Multe aldonis por la bela rezido en Pazarĝik ankaŭ la tre bona preparo de la kongreso. Brave al la samideanoj pazarĝikaj!

Sed finiĝas la jarfestoj. Po grupoj oni forveturas al siaj hejmoj. Por la tria tago matene restas malgranda grupo da sofianoj kaj ni varnanoj (ĉar niaj biletoj validas tra Sofio). Dum la reveturado ni ne ellasas la okazon ankaŭ propagandi. Ni amuzas per niaj belaj esperanto-kantoj tutan nian vagonon. Ĉe la stacioj ni flirtigas la standardojn kaj per nia esperanta repertuaro, kiu estas prezentata ĉe ĉiu stacidomo, ni altiras la atenton de ĉiuj homoj troviĝantaj tie. Post la kantoj postsekvas forta ĥora batalkrio: „Vivu, vivu, es-pe-ran-to!“

En tia amuza atmosfero atingas ni Sofion. Ĉi tie mi restas kaj havas la feliĉon esti inter la ĉeurbaj s-anoj ankoraŭ tri tagojn. Ĝuste semajnon post la forveturo de Varna, mi redirektiĝas per vagonaro al ĝi, al la reĝino de Nigra Maro. Nun mi veturas sola. Iuj el miaj samurbaj s-anoj estas forveturintaj, aliaj restas Sofion ankoraŭ kelkajn tagojn. Dum la tuta veturo mi ne povas min liberigi de l' bonega impresoj de la ĵusaj travivaĵoj. Kvazaŭ mi ankoraŭ aŭdas la kantojn, la kriojn. Eĉ jam en Varna mi estas daŭre en kongresa humoro. Nun mi komprenas, kial samideanoj, vizitintaj foje kongreson, malfacile povas sin deteni duan fojon ne viziti ĝin.

Zefiro (Varna)

## Prikongresaj pensoj kaj impresoj

Oni diras, nia movado stagnas pro manko de rimedoj. Tio estas vera, sed la esenca kaŭzo, laŭ mi, estas la foresto de la enhavo, la manko de la spirito. Ĉiuj koroj, mensoj kaj animoj ne estas tuŝitaj de tiu ĉi alta jarcenta revo de la homoj — de tiuj homoj, kiuj portas lumon kaj amon en si. La rimedojn venigas homoj, sed ne homojn — la rimedoj. Kiam venos en la movado homoj kun plenamaj kaj oferemaj koroj, lumaj mensoj kaj laboremaj volo, rimedoj kaj kondiĉoj per si mem kreigos, kiel ili estis kreitaj en la komenco de la e.-movado. La manko de rimedoj ne estas timiga. Pli timiga estas la manko de sindonaj laborantoj.

Por ni esperantistoj, la laboro por esperanto kaj esperanto-movado estas vera laboro. Ĉio alia estas bagatelaĵo. Vera laboro ĝi estas, ĉar ni opinias, ke ni proksimiĝas al nia idealo.

\*

La kongreson vizitis multaj homoj. Kiu ilin venigis? Ĉu simpla plezuro, ĝuo, scivolemo, kelkiuj por distri sin, sed la veraj esperantistoj, tiuj, kiuj portas la flamon de la e.-movado estis venigitaj de alta idealo tuthomara. Do, la veraj esperantistoj vizitas la kongresojn por plenumi sanktan devon al ĉiuj gefratoj — la homoj.

\*

Dum la laborkunsido estis klare rimarkebla la ĝojinda fakto pli granda preteco por laboro. Jam aperas novaj agantoj. Oni proponis bonegajn planojn por laboro, kiuj, se nun ne estas efektiveblaj, estonte estos. Nur necesas persisto kaj obstino.

\*

La kongreso dum tiu ĉi jaro estis eksterordinara. Tiun ĉi jaron oni festas la 50-jaran jubileon de esperanto. Vere ĝi estas jubilea kaj luma.

Rimarkeble estas, ke la movado faris paŝon antaŭen. En la estintaj kongresoj estis pli akraj kritikoj kaj bataloj. Nun oni estis pli toleremaj kaj senbrujaj.

\*

La ideo pri internacia lingvo estas belega kaj aktuala. Ĝi konstante kreskas kaj kreskos, ĉar havas potencon en si. Kaj ni ne estos mirigitaj, se morgaŭ ni akiros grandan sukceson, ekzemple, enkondukon de esperanto en la lernejojn. Tio venos nature. La vivo ĝin altrudos. Kaj tio estos por ni ne ĝojiga novaĵo, sed granda konfuzo, ĉar nia movado estas malforta kaj ne povas porti tiun ĉi grandan kaj pezan donacon, kaj certe ni baldaŭ ĝin perdos, ĉar ni ne havas multe da esperanto-instruistoj. Jen kial, ni sugestas al la Centra komitato pripensi kaj prizorgi la problemon pri somera kurso aŭ universitato por instruistoj en esperanto. La propono en la kunsido de samideano Dimov pri restarigo de la Esperanta ekzamen-instituto estas bonega, tamen ĝi ne donos sciojn kaj spertojn al la ekzamenitoj. Ili restos kun la sama scio, sperto kaj metodo. Sciojn kaj sperton la kursgvidantoj kaj estontaj instruistoj de esperanto en la lernejoj akiros en la kelkmonata somera esperanto-universitato.

A. Nikolov

## En la komuna loĝejo.

La amuzvespero en la „Ĉasista domo“ finiĝis post noktmezo. Ni — kelkaj sanoj el diversaj urboj, loĝantaj en komuna loĝejo, kiu estas en unu urba lernejo, ekiras al ĝi. La stratoj de Pazarĝik, kvazaŭ volante montri al ni sian modestecon, kiel hontema knabino renkontas nin per silento. Tombeja silento regas ĉie. Nur en la loĝejo, kie ni trovas kelkajn dormantajn jam gesanojn, estas bruo. Ilia monotona ronkado prezentas ridindan orkestron. Pro tio ni nevole laŭte ekridas. La dormemuloj vekigas kaj protestas, sed vane. Jen post ni alvenas alia grupo da loĝantoj kaj la bruo plimultiĝas. Unuj kantas, aliaj ludas per buŝharmoniko. La buŝoj de ĉiuj ĉeestantoj laboras kiel mueliloj. Eĉ la dormemuloj, konvinkiĝinte, ke ne povas silentigi nin, ekzidas sur la litojn kaj aliĝas al ni. La ĉambrego similas ne dormejon, sed frenezulejon. Pro tio ni decidis meti ordon per jena ma-

niero: Ĉiu el ni kuŝos, kaj kiu deziros kanti aŭ deklami, faros tion kuŝante. Komprenoble, ĉiuj konsentas. La esperantistoj devas esti disciplinitaj homoj. Ho, la litoj ne estas malbonaj, kiel ni antaŭe imagis. Ilia moleco kaj neĝblankaj littukoj prezentas veran plezuron.

Bravon meritas la Pazarĝikaj esperantistoj pro iliaj zorgoj al ni.

Kelkajn litojn okupas la Asenovgradanoj, Varnanoj, Kneĵano, Sofianoj kaj aliaj geesperantistoj el diversaj urboj kaj vilaĝoj.

Ni kuŝas kaj la koncertnumeroj komencas. La plej interesa numero estas je la fino, kiam la kneĵano ludas per buŝharmoniko kelkajn dormigantajn serenadojn. Post tio en la dormejo ekestas mortsilento, kvazaŭ neniu estus en ĝi.

Iomete malfrue, preskaŭ ĉiuj ekronkas kiel trolacaj laboristoj, laborintaj senĉese kelkajn tagnoktojn.

Jam frue matene de ie proksime preĝeja sonorilo sonoras. Gi vekas nin ĉiujn, kvankam ni dormis nur tri, kvar horojn. Plu ni ne povas fermi la okulojn kaj vole-nevole, ni ellitiĝas.

M. Pilosov

## Raporto

pri nia XXIV-a kongreso en Pazarĝik

(19.—21. de junio 1937)

Dimanĉe — la 20. de junio—en la granda salono de la urba teatro „Videlina“ okazis la solena malfermo de la kongreso. La salono estis brile dekorita per standardoj de ĉiuj ŝtatoj. Ĉeestis pli ol 500 personoj, delegitoj, gastoj kaj geurbanoj. La milita muzikistaro ludis la nacian himnon. La ĥoro de Sofia esp.-societo kantis la esperantan himnon „La espero“. La lasta kontentigis la esperantistojn kaj enportis en iliajn korojn impulson por nova paca batalado.

La kongreson malfermis per konvena kaj bela parolado s-ano eksministro Nikola Jotov, kiu substrekis, ke la bulgaraj esperantistoj faras multon por sia patrolando, ĉar per esperanto la bulgaraj esperantistoj propagandas tra la tuta mondo la bulgaran kulturon kaj la bulgaran literaturon.

S-ano Jotov proponis kaj la kongreso unuanime akceptis la jenan kongres-estraron: prezidanton Atanas D. Atanasov el Sofia, vicprezidantojn Penko Stoev el Plovdiv kaj Jordan Lupov el Pazarĝik, sekretariojn Georgi Dimov el Varna, Asen Grigorov el Sofia kaj Ĵak Behar el Pazarĝik.

La kongresprezidanto At. D. Atanasov donis sinsekve la parolon al la oficialaj reprezentantoj.

Unua salutis la kongreson s-ro Kenderov, urbestro. Poste parolis: reprezentanto de la loka militĉefo s-ro subkolonelo Petrov, s-ro At. Popov-regionestro, s-ro Kr. Genov — de la geinstruistaro, s-ro Ihas — fremdlanda samideano el Hungario, s-ro d-ro Jotov — de la Kultura urba komitato, s-ino Georgieva — de la Virina bonfara societo, s-ino d-ro Matakieva — de la Bonfara societo „Prosveta“, s-ro Harĝanov — de la Bulg. - jugoslava societo, s-ro Daskalov — de la societo „Amikoj de la kooperativismo“, s-ro Malinov — de la ĉasista s-to „Sokol“, kaj fine la filineto de nia fervora s-no Rad. Triĉkov el Vraca — Esperantina — salutis je la nomo de la infanoj parolantaj esperanton.

La prezidanto dankis al ĉiuj por la belaj paroloj.

Telegrame estis salutitaj la reĝo, la ministro de la publika instruado kaj la ministro de la komerco, kiuj bonvolis respondi ankaŭ per telegramoj.

Sekvis legado de saluttelegramoj kaj leteroj, ricevita de diversaj esperantistaj asocioj eksterlandaj kaj de diversaj enlandaj societoj kaj gesamideanoj.

La prezidanto proponis komisionon por la kontrolo de la rajtigiloj konsistantan el: M. Saraliev el Varna, Tr. Spasova el Sofia kaj Bor Milĉev el v. Kneĵa; komisionon pri la budĝeto konsistantan el: Iv. Vasilev el Pazarĝik, St. Jonĉev el Sofia kaj Sr. Petrov el Plovdiv; komisionon por la rezolucioj konsistantan el: D. Sasov el Asenovgrad, Em. Stratev el Sofia, Rad. Triĉkov el Vraca kaj G. Hârŝev el Sofia.

La kongreso akceptis la proponitajn personojn.

Dua tago

Je la 8:30 h. komenciĝis la kusido en lama lgranda salono de legejo „Videlina“,

sub la prezido de s-ano At. D. Atanasov, kiu tralegis la jenan tagordon:

1. Raporto de la komisiono por kontrolo de la rajtigiloj;
2. Raporto de la centra komitato;
3. Raporto de la kontrola komitato;
4. Debatado;
5. Estonta agado.

La tagordo estis sensange akceptita.

La komisiono por kontrolo de la rajtigiloj anoncis la jenan rezulton:

De la CK — At. D. Atanasov, B. T. Oktomvrijski kaj St. Gančev; de la kolektiva grupo — B. Milčev, Rad. Tričkov, N. Kalev, Al. Gerasimov, Konst. Konstatinov, Al. Dinkov kaj G. Popjanov;

Asenovgrad — Dav. Sasonov kaj At. Gaev; Varna — M. Saralieva, G. Dimov kaj Hr. Cvetkov; Pazarĝik — Iv. Vasilev, V. Lazarov kaj J. Behar; Plovdiv — Sr. Petrov kaj P. Stoev; Ruse — St. Radev kaj V. Julzari; Sevlievo — At. Nikolov kaj Hr. Simeonov; Sofia — As. Grigorov, Tr. Spasova, G. Hâršev, Em. Stratev, St. Jončev, B. Golemanov kaj Mladen Nikolov; Ŝumen — St. Dainikov kaj At. Lakov;

La asocia sekretario Belčo T. Oktomvrijski tralegis la raporton pri la agado de la centra komitato de BEA dum 1936—1937 jaro. La raporto estis sufiĉe detala kaj faris bonan impreson.

La kreskon de la membroj de B. E. A. la sekretario prezentis per la jena tabelo:

Societoj	Loko	1932/33	1933/34	1933/35	1935/36	1936/37
Kolekta grupo		17	27	47	59	80
Esp. societo	Sofia	21	31	35	47	66
„Radio“	Pazarĝik	16	7	15	19	32
„Albatro“	Varna	10	16	24	27	24
„Espero“	Ruse	—	26	34	3	22
„Lumo“	Tarnovo	10	15	20	19	21
„Fratiga stelo“	Sevlievo	—	6	—	7	15
„Vekiĝo“	Ŝumen	—	5	12	16	15
„Signo de l'espero“	Asenovgrad	—	—	—	—	12
„Solidareco“	Ruse	22	31	31	20	11
„Kulturo“	Plovdiv	12	10	15	13	11
„Stelo“	Kârĝali	—	—	6	1	7
„Toleremo“	Jambol	—	10	3	5	6
„Verda stelo“	Zl. livada	—	—	—	—	4
„Espero“	G. Orehovica	—	8	6	—	1
„L. L. Zamenhof“	Orehovo	10	17	12	4	1
„Rila verda stelo“	Dupnica	7	8	9	4	—
„Espero“	v. Stijerov	—	—	—	—	—
„Sukceso“	Vraca	12	10	8	—	—
Esp. societo	Lom	10	10	—	—	—
„Verdstelano“	St. Zagora	10	10	—	—	—
„Radio“	Samokov	5	1	—	—	—
„Nigra maro“	Burgas	20	—	—	—	—
„Mondlingvo“ stac.	G. Orehovica	5	—	—	—	—
Entute:		187	248	277	244	328

Fine la sekretario konkludis, ke malgraŭ la ekonomia krizo, kiu nin dolore tuŝis malgraŭ la malbonaj kondiĉoj de agado, la asocia jaro finiĝis per akiro de novaj pacaj batalantoj por la triumfo de nia kara ideo.

Post tio s-ano St. Gančev tralegis la raporton de la kontrola komitato kaj

konstatis, ke ĉiuj aferoj de la CK estas en plena ordo kaj ĉiuj elspezoj regule faritaj kaj atestitaj per la necesaj dokumentoj.

En la diskutado pri la raporto partoprenis la s-anoj: **Radev, Grigorov, Petrov, Julzari** — (kiu esprimas deziron, ke estonte la ĝenerala raporto de la CK



enhavu ankaŭ la raportojn de la esperanto-societoj), **Daniskov** k. a.

En la mezo de la diskutoj venis organo de la loka policinspektoro kaj laŭ ties ordono petis, ke oni parolu ne en esperanto, sed en bulgara lingvo.

La XXIV kongreso de la bulgaraj esperantistoj aprobis la raportojn kaj forigis la respondecon de la CK kaj de la KK de B. E. A.

Oni pridiskutis la estontan agadon de BEA

**Spasova** — Sofia: La abonpago al BE ne estu deviga por la membroj de la esperantaj societoj. La gelernantoj, la militistoj kaj la gesenlaboruloj pagu la kotizon je 50% da rabato.

**Julzari** — Ruse: oni aperigu semajnan gazeton por propagando de esperanto. Oni fondu esperanto-kooperativon por eldono de esperantaj libroj. Oni plifortigu la ligojn inter la asocio kaj la societoj. Ni interrilatu ankaŭ kun aliaj kulturaj organizaĵoj en la lando. Oni garantiu liberan ekziston por la esperantaj societoj (aludas pri la atencoj en Varna).

**Stoev** — Plovdiv: Mi ne povas kompreni, pro kio oni malpermesas al ni paroli en esperanto.

**Dimov** — Varna: Laŭ cirkulero de la Ministerio de komerco, industrio kaj laboro, esperanton oni enkondukas fakultative en la komercaj kaj la industriaj lernejoj. Ni bezonas taŭgajn instruistojn. Ni starigu ekzamenojn por la elementa kono de la lingvo kaj por instruado de esperanto.

**Jonĉev** — Sofia: La organo de la asocio „Bulgara esperantisto“ aperu monate. La abono estu 30 levoj. La abonpagojn enkasigu la societoj, kiuj ricevu ian procenton. La abono estu deviga por la membroj. Ni renovigu la lingvan komitataton. Ni interrilatu kun la kulturaj organizaĵoj.

**Petrov** — Plovdiv: Ni havos bonan organizaĵon, se ni havos monon. Ni faru fondon „Propagando“, kies kapitalon ni povus uzi por eldono de propaganda gazeto, aperanta plej multe 3–4 fojojn po jare. La abonantojn ni instigu pagi la abonon pli ofte. Mankas bonaj lektoroj

de esperanto. Ni propagandu la lingvon inter la geinstruistoj — ili gvidu la kursojn.

**Triĉkov** — Vraca: Ni ne apartigu la abonon de la membra kotizo. Ni malpermesu la eldonon de malbonaj lernolibroj. Ni organuzu kolektivitan korespondadon inter la societoj. Ni interŝanĝu esperantajn gazetojn. Mi deklaras, ke mi estas preta referi en certaj urboj de la lando pri esperanto. Ni interrilatu kun la bulgara legeja unuiĝo, instigante, ke ĝi rekomendu la ellernon de esperanto al siaj membroj. Ni petu la unuiĝon de instruistoj uzi la kolekton de infanaj bildoj de Doĉo Dimitrov el Orehovo.

**Sasonov** — Asenovgrad: Ni pretigu la junajn esperantajn agantojn, kaj ne atendu, ke ili aperu mem. Ni interrilatu kun la kulturaj organizaĵoj. BE ne estas bone redaktata. La kulturaj okazintaĵoj ne estas menciataj. Ili estas interesaj ne por ni, sed por la samideanoj el fremdlando.

**Behar** — Pazarĝik: Ni plibonigu la redaktadon de BE; novan gazeton ni ne eldonu. La BE aperu monate sen pliigo de la abonkosto. Ĝi estu deviga por la abonantoj.

**Vasilev** — Pazarĝik: Ni organuzu kulturajn komitatojn.

**Radev** — Ruse: La celoj de la statuto estu plivastigitaj, nome: propagando de la kulturo, la moroj, la estinto kaj la belaĵoj de nia lando. La nomo de la asocio aliformiĝu je „Nacia bulgara esperanta asocio“. Ni faru sekciojn por komerca informo, turismo kaj kulturo. Ni reorganuzu la asocion: Ni formu du aŭ tri regionojn laŭ la plano de la decentralizo.

**La prezidanto** s-ro Atanas D. Atanasov resumas, respondas kaj voĉdonigas la proponojn.

La XXIV kongreso de la bulgaraj esperantistoj decidis:

Malakceptas la proponon por fondo de esperanta kooperativo pro manko de rimedoj kaj de favoraj kondiĉoj.

Malaltigas la membro-kotizon por gelernantoj, militservantoj kaj senlaboruloj je 50%.

La abono de BA estas nedeviga por la membroj.

Ĝi rekomendas:

a) Fondi kulturajn komitatojn en ĉiu urbo, kie estas esperanta societo;

b) Instigi, ke oni enkonduku la nedevigan instruon de esperanto en la lernejoj;

c) Pridiskuti la demandon pri taŭgaj gvidantoj de esperantaj kursoj;

ĉ) Ordigi la enkasigon de la abono por BE;

d) Enkasigi la ŝuldatan monon;

e) Organizati kolektivajn korespondadon de la esperantaj kluboj je diversaj temoj;

f) Reguligi la propagandon per la gazetaro;

g) Interrilati kun la Bulgara legeja unuigo por organizo de kursoj;

ĝ) Pliibonigi la redaktadon de B. E. Ĝi devigas la estontan CK esplori ĉu eblas, ke oni ŝanĝu la nomon de la asocio je „Nacia bulgara esperanta asocio“.

Malaprobis la proponon, ke la fondojn faru nur la kongreso.

La prezidanto s-ro Atanas D. Atanasov fermis la kunsidon en la 13. horo.

#### Posttagmeza kunsido

La 21-an de unio estis malfermita la tria kunsido de la XXIV kongreso de la bulgaraj esperantistoj.

Ĉeestis la kongresa komitato, la delegitoj kaj gastoj.

Tagordo:

1. Raporto de la komisiono de la budĝeto.

2. Raporto de la komisiono de la rezolucioj.

3. Diversaj.

4. Elekto de membroj de CK kaj de KK

La kongreso akceptis la novan budĝeton kaj la rezoluciojn.

La prezidanto s-ro Atanas D. Atanasov sciigis, ke estas ricevita respondo de la telegramo al nia reĝo (senĉesaj aplaŭdoj).

**Atanas Nikolov** — Sevlievo invitis je la nomo de la esperanta societo en Sevlievo la XXV kongreson de la bulgaraj esperantistoj en Sevlievo.

La kongreso decidis:

La XXV kongreso de la bulgaraj esperantistoj okazu en Sevlievo.

Ĝi devigas la estontan CK difini la daton

Oni elektis balotan komision jene: Asen Grigorov, Georgi Dimov, Ĵak Behar, kiu gvidu la baloton por novaj membroj de CK kaj KK

El 34 regulaj delegitoj voĉdonis 28 personoj.

Ĉiuj balotiloj estis regulaj.

Estis elektitaj la jenaj personoj:

#### Centra komitato:

Atanas D. Atanasov . . . . .	23 voĉoj
Petro Jordanov . . . . .	28 „
Belĉo Oktomvrijski . . . . .	27 „
Georgo Harŝev . . . . .	27 „
Emil Stratev . . . . .	27 „
D-ro Zahari Zahariev . . . . .	24 „
Asen Grigorov . . . . .	21 „

#### Kontrola komitato:

Kiril Georgiev . . . . .	28 „
Stefan Ganĉev . . . . .	28 „
Ivan Iliev . . . . .	28 „

La vicprezidanto komunikis la supran rezulton, post kio sekvis tondraj aplaŭdoj.

\* \* \*

Nun, karaj gesamideanoj, kuraĝe antaŭen!

Ni ĉiuj, kiuj partoprenis la kongreson, revenis hejmen kun bonegaj impresoj kaj kun entuziasmo labori por novaj sukcesoj!

Do, ni unuigu niajn fortojn, kaj tiel unuigite ni diru: „ĝis revido en Sevlievo“.

**B. T. Oktomvrijski**

Всѣки есперантистѣ трѣбва да стане членѣ на Българския есперантски сѣюзѣ, да получава сѣюзния органѣ «Bulgara Esperantisto» и да сѣдействува сѣ всички сили и срдства за успѣха на общото дѣло!

Сѣбирайте усилено нови абонати!

Отѣ това зависи месечното излизане на сѣюзния органѣ и всестранното му подобрене!

# Esperantaj leteroj

## Letero el Berkovica

Esperanto-movado en nia urbo datas de 1924/25 jaro, kiam estis malfermita la unua kurso, gvidita de lernanto-gimnaziano. El la 20 kursanoj fariĝis esperantistoj nur kelke da lernantoj. En la postaj jaroj oni organizis ankoraŭ kelke da kursoj, tamen la rezultoj ne estis tre bonaj. Nur kelkaj lernantoj kaj laboristoj vizitintaj la kursojn daŭrigis poste memstare lerni la lingvon kaj fariĝis esperantistoj.

Ĉirkaŭ 1931 jaro la esp. movado en nia urbo floris. Tiam ni ricevadis po dekoj da ekzempleroj de la aperantaj tiam esperantaj kaj bulgare-esperantaj gazetoj („Bulgara Esperantisto“, „Balkana Laboristo“, „Межд. езикъ“ k. a.). Tiam ankaŭ ekzistis grupo da esperantistoj, kiu havis tre viglan vivon, tamen ne aliĝis al Bulg. Esp. Asocio.

De tiam la esperanto-movado iom post iom ĉesigis sian disvolviĝon. Nur kelkaj esperantistoj agis aparte kaj izolite. Nature, la neorganizita agado donis nenian rezultojn.

Nun la esperantistaro en nia urbo konsistas el unu kuracisto, du studentoj, kvar instruistoj, du laboristoj kaj du aliaj. Do sume ĉ. 10 homoj. Estas plia deko, kiu lernis la lingvon, sed ne povas ĝin uzi. Krom tio en tri niaj proksimaj vilaĝoj estas tri eksinstruistoj, bonaj esperantistoj.

Dum nuna somero (1937) mi malfermis malgrandan kurson kun kelke da kursaninoj-lernantinoj. Rezultojn ni ankoraŭ ne havas, ĉar ni estas en la komenco de nia laboro.

Georgo Lozanov

## Korespondajo el Malo-Konare

Nia vilaĝo (5,000 loĝantoj) estas centro de agrikulturo (rizo, greno, akvomelonoj, fruktĝardenoj, kanabo). Ankaŭ oni bredas tre bonajn ĉevalojn, porkojn kaj ŝafojn (la ĉevaloj estas rasaj: arabaj, anglaj ktp.).

Iom pri la kultura vivo. Nia vilaĝo posedas modernan lernejon, en kiu 19 geinstruistoj instruas 800 gelernantojn. Dum la somera sezono estas organizita infana ludejo Funkcias legejo kun 150 anoj.

Nun en nia vilaĝo loĝas 20 geesperantistoj, sed bedaŭrinde neorganizitaj. Ili estas tre okupataj je kamplaboroj. Dum la vintro ni havis kurson de 50 personoj. Kursgvidantoj estis s-roj Slav Delkinov (libristo) kaj Stefan Baev (veterinaro).

Kiel plantiĝis la esperanta semo en nia vilaĝo?

La unuaj pioniroj estis la instruistoj Hristo Enev kaj Stefan Lakov (la lasta jam mortinto), kiuj organizis la unuan e.-kurson dum la vintro 1930.

Grozdan K. Miŝev

## Perfektiga radio-kurso en Kneja

Dum novembro 1936. ni malfermis esp. kurson por progresintoj. Ĝi daŭris 6 monatojn. Ĝi okazis unufoje semajne, vespere, dum 3 horoj. Kiel kunveno servis al ni la atendejo de s-ino D-ro Angelova.

La meza nombro de la frekventintoj estis 7, el kiuj 2 fraŭlinoj. La lastaj, kvankam pli malmultenombraj ol la viroj, estis tamen pli persistaj. Ĝenerale la nombro de la progresintoj estas pli konstanta ol tiu de la elementaj kursoj.

La ĉefa laboro de nia kurso estis la esperanta vivparolo. La kanvaso de nia konversacio estis la valora sintakso de D-ro Zahariev. Per radio-aparato ni povis aŭskulti esperantajn paroladojn el Ĉeĥoslovakio (Moravska-Ostrava), Holando (Hilversum), Francio (Liono) k. a. Tiel ni ekzercis nian oreton je fremda elparolo.

Je la kvina monato alfluis la fininta kurso de s-ro Milĉev. Tiam li daŭrigis ekzercigi siajn gekursanojn laŭ la konvena legolibreto de s-ro Gaŝevski. Dum la ripoztempoj s-ro Karlukov, nia radio-majstro,

regalis nin per bela muziko, per iu interesa parolado el Radio-Sofio kaj per la novaĵoj de la lasta. Tiel ni penis fari nian kurson ne nur utila, sed ankaŭ interesa kaj agrabla.

Same la lingva parto de la kurso estis pli interesa, pli utila kaj pli agrabla ol tiu de la elementaj kursoj. Unuvorte, la perfektigaj kursoj por tiuj, kiuj jam gvidis elementajn kursojn kaj por la kursanoj mem, estas fonto de ĝuo, ne nur lingva, sed ankaŭ idea kaj socia.

Kneĵa, julio 1937.

D-ro Agro

## La kooperativa bieno en Proslav

Urbo Plovdiv kaj ĝia regiono, estas konataj ne nur per sia pasinteco, progresinta kulturo, bela ĉirkaŭaĵo, mineralaj banejoj kaj t. p., sed ĝi estas konata ankaŭ kiel unu el la plej fruktodonaj partoj de Bulgario.

Estas vilaĝoj, kiuj estas famaj per siaj desertaj vinberoj, fragoj, akvomelonoj, sed plejmulte per sia produktado de fruaj legomoj.

Ne tro malproksime, ĉirkaŭ 4 km., kiam oni ekiras suden de Plovdivo, sur ŝoseo Plovdivo—Peŝtera vi atingos la malgrandan vilaĝeton Proslav — (Meĉkjur) konata per siaj dolĉaj akvomelonoj. La vilaĝeto estas situata sur ebenaĵo kaj la regiono estas ne tre bela, ĉar mankas grandaj arbaroj.

Ĝi nombras ĉirkaŭ 150 domojn. La loĝantaro estas pure bulgara, sed kun turka spirito — estas malkonfida al la novaj kulturaj akiraĵoj. Ekzistas unuagrada lernejo kaj legejo, kiu konservas tre valorajn trezorojn de la penso.

La loĝantaro sin okupas per agrikulturado, vinberkulturado, ĝardenkulturado kaj rizkulturado.

Tiu ĉi vilaĝo, kiu posedas ĉiujn objektivajn kondiĉojn por disvolviĝo ekonomia kaj kultura estas elektita de grupo da idealistoj — Tolstojanoj, kiuj metis la fundamentojn de la vegetara agrikultura kooperativo, kiu ekzistas de la jaro 1925. Ĝi posedas terenon de 264 dekaroj. Ĉiuj loĝantoj de tiu ĉi tereno estas vegetaranoj—Tolstojanoj, kiuj vivas kaj laboras. Kun siaj familioj ili nombras

ĉirkaŭ 20 homojn, viroj, virinoj kaj infanoj. Krom ili estas ankaŭ alia speco de membroj — kunhelpantoj kiuj ne loĝas en la bieno sed la tendenco estas ke ankaŭ ili estiĝu ĝiaj estontaj loĝantoj. La interna vivo estas metita sur kolektivaj kaj individuaj bazoj. La membroj laboras kolektive aŭ individue laŭ sia deziro.

En la komenco la tereno aspektis nuda kampo. Hodiaŭ, sub la komunaj klopodoj, ĝi estas aliformigita en florantan ĝardenon. Estas tri pumpoj elektraj, kiuj eltiras akvon el kvardek-metra profundo kaj donas eblecon, ke oni kulturu ĉiujn agrikulturajn branĉojn: vinberojn, fruktojn, fragojn kaj legomojn.

Esperanto, kiu en siaj fundamentoj kaŝas la samajn ideojn, trovis bonan grundon. Tri personoj parolas tre bone en esperanto kaj preskaŭ ĉiuj ceteraj estas komencantoj, kun la tendenco estiĝi bonaj esperantistoj.

En konstanta kontakto kun la ĉirkaŭanta loĝantaro, ili laboras por ĝia tutflanka vekigo. Vintre ili aranĝas en la vilaĝo vesperfestojn kaj amuzojn kaj iuj el ili paroladas pri diversaj temoj.

Ilij Grigorov

## Ĉe la plej malnova esperantisto

Kneĵa. Nia verda rondo faris ekskurson al Bela Slatina.

Aperis la ideo, buŝa propagando rapide disportis ĝin tra la promenejo kaj baldaŭ post tio jam estis sufiĉaj aliĝintoj por bona ekskurso.

\*

Printempa mateno. Rosaj gutoj, disĵetitaj en la herbo, brilas kiel perloj, reflektante la lumon de la suno. Aero malvarmeta, aromita de la florantaj akacioj. Jam ĉiuj venis je la fiksitaj horo kaj loko, kaj ni ekmarŝas al la celo. Ni paŝas vigle, ĝuas la belan matenon, kantetas, interparolas esperante kaj tiel pasas nerimarkite la 12 kilometran distancon inter Kneĵa kaj Bela-Slatina. La urbeto jam vidiĝas antaŭ ni bele situata en la malaltaĵo. Ni ne eniras la urbon tuj, sed restas en la akacia parko apud la artefarita lageto,

ĉe la fino de la urbeto. Tie ĉi sur la herbo ni komune matenmanĝas. La herbejo, kiu servas al ni kiel manĝotablo, estas sufiĉe vasta por akcepti nin, kvankam la sternitaj kovriloj sur la herbo jam ne sufiĉas. Tie ĉi ni pasigas la tagon, en gaja amuzo.

Vesperige ni iras en la urbon por viziti nian malnovan samideanon — s-ron **Vasil Gaŝevski**.

S-ro **Gaŝevski** estas la plej malnova kaj la plej maljuna samideano en nia lando. Li estas naskita en la jaro 1860 en vilaĝo **Kojnare**. Li studis en **Pleven** kaj aliaj urboj kaj absolvis gimnazion en **Kjustendil**. De tiam li dediĉis sin al popolinstruado, kiel elementa lerneja instruisto. Unue li komencis lerni la lingvon „**Volapük**“, tamen baldaŭ malesperiĝis kaj forlasis ĝin. Nenion mi komprenis“, diris li. Esperanton li komencis lerni en la jaro 1887-a, nelonge post ĝia publikigo. Pro manko de bulgaraj lernolibroj, li havigis al si rusan lernolibron kaj gramatikon, entuziasme eklernis kaj rapide progresis. S-ro **Gaŝevski** konas laŭnome aŭ persone preskaŭ ĉiujn malnovajn esperanto-pionirojn en la tuta mondo; li mem ja estas unu el ili. Li konas, korespondis aŭ interparolis kun famaj esperantistoj kiel prof. **Théophil Cart-franco-red.** de „**Lingvo internacia**“; **D-ro Robin** el **Bukureŝto**; **Edmond Privat**; **Kolomano Kalocsay**,

**Andreo Ĉe**, **H. Fiŝer** k. a. Li vizitis la interbalkan esp.-kongreson en **Bukureŝto** kaj la internacian en **Budapeŝto**. Krome li vizitis la kongresojn en **Arad** kaj **Kluĵ** — **Rumanio** kaj preskaŭ ĉiujn niajn landajn esp.-kongresojn. Dum sia instruado li gvidis du esp.-kursojn. Kvankam 77-jara, s-ro **Gaŝevski** estas ankoraŭ vigla kaj entuziasma samideano.

Ni estis kore bonvenigitaj de li kaj de liaj familianoj.

Ne ĉio estas esprimebla, kion oni sentas. Jen estas la fruktoj de la internacia frateco kaj solidareco, jen novaj parolantoj la lingvon de la paco kaj de la amo, la lingvon de ĉiuj homoj sur la tero!

S-ro **Gaŝevski** rakontas al ni pri la esperantista vivo dum la pasinteco, pri la grandaj malfacilaĵoj de niaj antaŭuloj, pri la fremdlandaj esperanto kongresoj, kiujn li estas vizitinta kaj pri nia Majstro.

Estas jam malfrue. La suno alsendas siajn lastajn radiojn. Ni jam devas ekiri. Antaŭ la ekiro ni faras komunan fotografadon en la hejmo de s-ro **Gaŝevski**.

La gesamideanoj el **Bela Slatina** akompanas nin ĝis la altaĵo, ekster la urbo, kie sekvas nova adiaŭo, nova interŝanĝo de bondeziroj.

Plenplenaj de sentoj kaj kun kantan-taj koroj ni ekpaŝas sur la ŝoseo al **Kneĵa**, daŭrigante salute svingi niajn manojn.

**Borislav Milĉev**

## Recenzejo

*Eksplodo de l'paco*, de **Edward Ozimek**. Tradukita el pola lingvo. Eld. de l'aŭtoro — **Edward Ozimek**, **Warszawa**, **Dluga 28/47**. Pollando.

Jen estas pasia krio kontraŭ la plej granda krimo: la milito. Multe da maldolĉa vero diras la aŭtoro — simpla fervojistopensionulo, kaj laŭ originala maniero li ankaŭ rekomendas la recepton kontraŭ la milito — krei sistemon de unuigitaj ŝtatoj de l'mondo. En 44 punktoj li tuŝas diversajn problemojn, sed plej interesa por ni esperantistoj estas la propono pri enkonduko de esperanto (punkto 17), des pli, ke **Ozimek** mem ne estas esperantisto:

„Por ke estu ebla plena alproksimiĝo kaj ekkonatiĝo inter ĉiuj homoj kaj ĉiuj

rasoj, oni devas enkonduki en ĉiujn lernejojn — krom la gepatra lingvo — ankaŭ la instruon de la internacia lingvo esperanto. Ĉiun pluan diskutadon pri tiu ĉi lingvo oni devas forĵeti, ĉar esperanto montriĝis la plej facila, ĝi faris sian vivekzamenon kaj — ĝenerale ni ne havas tempon por lingva diskutado, kiam la mondo brulas. Lingvo internacia por ĉiuj estas la plej potenca faktoro de l'paco kaj kultura progreso. La Ligo de Nacioj davas plej baldaŭ komenci sian ofidadon en lingvo esperanto“.

La esperantistoj en sia grandega plejmulto estas pacifistoj, kiuj praktike efektivas la alproksimiĝon kaj interfratiĝon de diversnacionoj. Tial ili kun intereso legos la broŝuron de **Ozimek**.

**As. Grigorov**

## Nia diskutejo

### Fondo por propagando

Nediskuteble, tiun-ĉi jaron nia C. K. iniciatis kaj realigis bonajn aferojn: unue, la organo, kiun vi legas, due, la frukto-dona propaganda vojaĝo de s-ro Poŝka kaj trie, la ideo por propaganda fondo.

Mi volas iom pridiskuti la lastan. Multaj estas la kauzoj por ke niaj societoj tro malfrue aliĝu al la Asocio. Ekzistas ankaŭ tiaj por la neakurateco de la individuaj membroj. Tamen ĉu ni rajtas turmenti niajn CK-anojn, kiuj ĝustatempe komencas agi, sed baldaŭ devas ĉesi pro manko de mono? — Certe nel — Nu, tiam ni certigu al ili la necesan monon ĝuste per tiu propaganda fondo!

Tiu fondo funkcios kiel la rezervaj materioj de la semoj. Dank' al ili, ĉe konvenaj kondiĉoj: malseko kaj varmo, la planteto ekĝermas, kreskas, montras sin super la supraĵo kaj verdiĝas. De tiu momento ĝi komencas asimili, t. e. memstare produkti novajn materiojn. Finfine la nova planto produktas multajn semojn, ĉiu el kiuj estas provizita, per rezerva fondo por certigi la ekkreskadon ĉe eventuala ebleco.

Ankaŭ la maŝinistoj bone aplikas la rezervprincipon per sia „kompresoro“. Tiu ĉi estas metala barelo, en kiu la maŝino

premigas aeron dum sia laboro. Kiam la maŝinisto volas ekfunkciigi sian maŝinon, li facile turnas la kranon de la kompresoro kaj la premita aero ekpuŝas la pezegan pistonon. Tiam sekvas la laboro de la uzata forto: vapora, nafta aŭ alia kaj la maŝino estas en laboro. Sen kompresoro, kelkfoje multaj personoj devas longe penegi.

Do, karaj legantoj, se ni volas ŝpari la ĉiujarajn ekajn penegojn de nia Asocio, tiam ni de nun plenigu nian kompresoron, ni amasigu rezervajn materiojn, ni kolektu nian propagandan fondon!

La CK-anoj certe zorgos replenigi la menciitan fondon dum la jaro, kiam nia Asocio estos en plena laboro.

Helpi la fondon por propagando en tiu momento egalas helpi plej efike nian esp. movadon. Kaj ĉiu, laŭ siaj fortoj, povas iom helpi. Do, ni ne preterlasu la bonan okazon, ĉar preterlasita okazo ne revenas.

Kneĵa, julio, 1937.

D-ro Agro

La redakcio invitas ankaŭ aliajn s-anojn diri sian opinion pri la maniero, laŭ kiu oni devas agi kaj propagandi kaj pri la fontoj, el kiuj oni devas serĉi kaj kolekti monrimedojn.

### Zigzage tra la gazetaro

En „*Nia gazeto*“ (*Nice-France*) № 7 (43) sub la titolo: *Konsilindaj klopodoj* ni legas la jenon:

„Esperanto - Centro Itala dissendis cirkuleron al ĉiuj Landaj Asocioj kaj Federacioj por altiri ilian atenton al la fakto, ke la *esperantlingva porturisma propagando* (per radio, broŝuroj, konkursoj ktp.) *ne helpas la esperanto-novadon* en tiu lando, kiu tian propagandon faras; ĝi utilas, male, por la propagando de esp. to eksterlande. „Ni estas certaj do—skribas niaj italaj samideanoj—ke, se ankaŭ aliaj registaroj farus same kiel la itala

registaro, ni povus profiti ĝeneralan propagandon **por esperanto**, kiu estus farata de la registaroj: tio estas por ni ĉiuj afero ege utila“.

La sendintoj de la cirkulero aldonas: „Se ĉiu Landa Esp-sta Asocio tuj agados ĉe sia registaro . . . — la italoj konvinkas — . . . ĉiu Landa Asocio ne nur faros tre efikan servon al esperanto, okaze de ĝia jubileo, sed ankaŭ tre valoran servon al **sia lando mem**“.

La proponoj de Esperanto - Centro Itala estas ĝustaj kaj praktikaj, kaj neniu povas konsideri ilin neefektivindaj. . . Oni

povas eĉ sin demandi, kial de ĉirkaŭ du jaroj neniu — almenaŭ laŭ nia scio — el la Landaj Asocioj entreprenis la konsilitajn kaj konsilindajn klopodojn, kiujn firme apogas la itala ekzemplo.

*Esperanto* de UEA (Genevo), julio.

Konata esperantologo *Petro Stojan* en rimarkinda studo „Evoluo de esperanto“ diras pri la batalo inter landnomaj sufiksoj „ujo“—„io“ :

„La batalo ne estis longa. Same kiel

en 1909, la atakitoj (t. e. „-io“-anoj) tuj cedis kaj kelkaj gazetoj, ligitaj iel al la „oficialaj institucioj“ revenis aŭ restis je la „ujo“. Tamen la plimulto, precipe laboristoj, sendependaj samideanoj, novuloj ne „disciplinitaj“, definitive adoptis la io-sistemon“.

En ĉi-sama numero de „Esperanto“ ni legas grasliteran: „Vizitu Ĉeĥoslovakion...“ kaj sur la dorsa paĝo etliteran: „Mukaĉevo 3, Ĉeĥoslovakujo“.

O. Vitro

## Kultura observo

### Marin Drinov

En la urbeto Panagjuriŝte oni ĵus inaŭguris la monumenton de Marin Drinov.

Kiel instruisto, profesoro kaj ministro Drinov faris multe da soci-utilaj aferoj. Lia kritika intelekto penetris profunde en nian pasintecon kaj forigis ĉion, kio malhelpis la korektan evoluon de la bulgara popolo. Li diris kion ni prezentas kiel nacio kaj kion ni devas fari, por antaŭeniri. Per siaj sciencaj studoj li fiksas la etnografiajn limojn de Bulgario kaj diris kion ni devas konsideri kiel komencon de nia renesanco. Li malkovris Paisij. Li fiksas la bulgaran literaturan lingvon. Li elektis Sofion kiel ĉefurbon de Bulgario. Li fondis la Bulgaran Literaturan Societon, la Nacian bibliotekon kaj aliajn kulturajn institutojn.

Drinov estas kreinto de la bulgara demokratia konstitucio kaj ĉiel penis ĝin konservi.

### La bulgara soci-opinio pri rasismo kaj antisemitismo

Ĵus aperis bulgarlingve tre interesa libro sub ĉi-supra titolo, enhavanta enketon de proksimume 60 eminentaj reprezentantoj de la bulgara socio, scienco, literaturo kaj arto, koncerne la problemojn de rasismo kaj de antisemitismo. Ĉi problemoj ricevis ĉiuflankan kaj plenan lumigon per la respondoj, donitaj de la invititaj personoj al jenaj tri punktoj: 1) kion vi opinias pri la rasismo kiel teorio kaj praktiko? 2) Kiel vi klarigas la antisemitismon? 3) Via opinio pri la judoj ĝenerale kaj speciale pri la judoj en Bulgario.

La libro estas neniiga kondamno por la antisemita movado, kiun ĝi taksas barbara aperaĵo kaj makulo por la nuntempa kulturo.

Grig

## Изложение отъ Централния комитетъ до г. Министра на вътрешнитѣ работи

По поводъ неприятността, която конгресиститѣ изпитаха въ заседанието на конгреса въ Пазарджикъ на 21 юний т. г., Централниятъ комитетъ отправи до г. Министра на вътрешнитѣ работи и народното здраве следното изложение (което въ преписъ бѣ дадено на всички

останали министри съ подходящи придружителни писма):

Господине Министре,

На 20. и 21. юний т. г. въ Пазарджикъ се състоя 24-ятъ конгресъ на БЪЛГАРСКИТѢ ЕСПЕРАН-

Т И С Т И, обединени въ Българския есперантски съюзъ.

Българскиятъ есперантски съюзъ е културна организация, която работи за разпространението на международния помагаленъ езикъ есперанто всрѣдъ българския народъ, чрезъ курсове, сказки, печатни издания, чрезъ организиране приложението и използването на езика и пр. Ласкаемъ се да вѣрваме, че съ своята дейность, редомъ съ другитѣ културно-просвѣтни организации въ страната, и ние допринасяме своя дѣлъ за всестранното културно въздигане на нашия народъ. Освенъ това девизътъ на българскитѣ есперантисти е: „Чрезъ есперанто за България“; съ преводи на български автори, съ книги, статии, сказки, съ кореспонденция българскитѣ есперантисти отъ редъ години запознаватъ външния свѣтъ съ културата, литературата, бита и историята на българския народъ и печелятъ симпатии за неговата кауза.

Сегашниятъ Български есперантски съюзъ съществува отъ 1907 година като организация, винаги съобразена съ надлежнитѣ законоположения въ страната и съ утвърденъ уставъ отъ съответнитѣ власти. Той е редовно легализиранъ и по сега действащитѣ законоположения.

На своитѣ конгреси българскитѣ есперантисти разискватъ обикновено на есперанто, като използватъ тѣзи случаи да упражняватъ въ дебати езика, който разпространяватъ. Това е нѣщо твърде естествено и се практикува въ всички организации, ратуващи за разпространяването на нѣкой езикъ: Лигата на говорещитѣ английски, Алиансъ Франсезъ и пр.

По този начинъ между другото и всѣки неесперантистъ, който иска поне да чуе и види какъ звучи и какъ се прилага езикътъ, ще има тази възможность.

Воденето на заседанията на есперанто се явява особено необходимо, когато присѣдствуватъ и чуждестранни есперантисти като гости, каквито имаме почти на всѣки нашъ националенъ есперантски конгресъ.

Тази година за първи пътъ българскитѣ есперантисти имаха едно твърде неприятно и непонятно вмѣшателство

на органи на полицията въ конгреснитѣ имъ работи: на втория конгресенъ день, 21. юний, къмъ срѣдата на предобѣдното заседание, предъ председателя на конгреса се яви единъ органъ на полицията, и, следъ като посочи легитимационната си карта, съобщи, че по заповѣдъ на мѣстния полицейски инспекторъ разискванията не могатъ да се водятъ на есперанто, а трѣбва да се говори само на български.

Явно е, че такова нареждане не почива на никой законъ и че въ случая имаме превишаване на власть отъ страна на единъ отъ Вашитѣ подведомствени органи.

Въпрѣки това съзнание, въпрѣки голѣмото огорчение и негодувание, което изпитаха отъ тая нетактичность, въпрѣки че трѣбваше да се търсятъ твърде неестествени обяснения, за да се оправдае предъ чужденцитѣ — гости това внезапно преминаване отъ есперантски къмъ български говоръ въ дебатитѣ, българскитѣ есперантисти се подчиниха на това нареждане, за да не даватъ излишни зрелища, за да подчертаятъ своята дисциплинираность като граждани, обаче, и съ дълбока увѣреность, че въ България има просвѣтена власть, която нѣма да остави ненаказана една такава противозаконна проява на отдѣлни свои органи, които съ подобни необмислени действия могатъ да убиятъ у гражданитѣ вѣрата въ реда и законността въ страната, да отчуждятъ управлението отъ народа и да ни изложатъ предъ външния свѣтъ.

Като донасяме това до Вашето знание, ние Ви молимъ, Господине Министре, да наредите да се проучи, кой органъ на полицията въ Пазарджикъ извърши тая незаконномѣрна постѣпка, и дадете заслуженото възмездие, за да се запази престижътъ на властта и да се даде морално удовлетворение на тия български граждани, които бѣха оскърбени по такъвъ начинъ и при все това, запазиха спокойствие и проявиха дисциплинираность предъ своята държава.

Председателъ: (п) **Ат. Д. Атанасовъ**  
Секретаръ: (п) **Б. Т. Октомврийски**

Redakta komitato:

**Asen Grigorov kaj Emil Stratev**